

## ILEI

### Komitatkunsido ĵaŭdon la 15-an de julio 2010.

Ĉeestas 9 komitatanoj komence, poste 12; la prezidanto prezidas.  
 (Aldonaj kompletigoj/demandoj SMG blue: 25 jan 2011. Jen 28 jan ne alvenis klarigoj, do la demandoj restas – se poste venos klarigoj, ni ĝisdatigos la protokolon. SMG)

Tagordaj punktoj kaj rimarkoj estas jenaj:

#### *Estrara raporto 2009*

La estrara raporto pri la jaro 2009 aperis en la Konferenca libro ekde paĝo 24.

Rob Moerbeek proponas aldoni la nomon de LIBE al la listo de partneroj en la “Taskoj sen plenumantoj”: Li petas atenton por Indiĝenaj Popoloj; la prezidanto diras ke ĝi jam estas en la listo. Rob atentigas, ke ‘Togolando’ estas la ĝusta nomo por la afrika lando. Tri sekcioj de ILEI jam eksigis sin per nedeklaro de membroj: Britio, Rusio kaj Irano; Rob sciigas ke li volas kontakti la iran sekcion pere de UEA.

La ĝusta elcento en ĉapitro 2 de la Estrara raporto pri la proporcio de sekcioj respondintaj al la demandilo por 2009 estas 82%, laŭ kalkulo pri ĉiuj sekcioj.

Alvenis aliĝpeto por sekcio en Hispanio, sed mankas tie membroj; ekzistas espero ankaŭ pri Bulgario; tie instruistino preparas fondon. Unue oni anoncos reprezentanton. En Armenio oni eble povas fondi sekcion; estas tre aktiva persono kun kvino da membroj. Serbio esprimis la deziron fondi sekcion (Serba Esperanto-Asocio). La prezidanto atentigas ke per la reto la internacia ligo sendas sciigojn al la sekciestroj kaj komitatanoj kaj tra aliaj listoj, sed ne rekte al la membroj. Sekciestro do estas tre grava, kaj devas pluperi la mesaĝojn de la internacia ILEI al siaj membroj. Indas ekscii kiom da sekcioj havas enlandan komputilan grupon. Ni povas paroli pri tiu grava ero en la komuna grupo.

Svedio kaj Brazilo havas propran hejmpaĝon [SMG: plie Aŭstralio, Brazilo, Finnlando, Germanio, Hungario, Katalunio, Korea Resp., Pollando, Svedio, Usono kaj Kanado]. Necesas en niaj propraj retejoj kontrolon de la "trakonektoj", kelkaj el tiuj eble ne plu estas ĝustaj.

La sveda reprezentanto diras ke en Svedio estas 32 membroj. [SMG: Tamen estas 12 deklaratitaj al ni]. La sveda sekcio pagis por membro de sia propra sekcio (al UAM). [SMG: ILEI ne konscias pri tio. Niascie nur Pollando faris tion. Dezirindas ricevi informojn.]

Brazilo: stipendio estis donacita el Brazilo al personoj kiuj studis en UAM, revenis sed faris nenion poste. [SMG: ILEI ne konscias pri stipendio por Brazilano. Eble ne temas pri UAM? Aŭ pri la trijaraj kursoj? Estus interese scii, kiu donis tiun subvencion, ĉu la sveda sekcio?]

La prezidanto rakontis pri la rezultoj de la subvenciado de la instruisto-trejna kurso en Poznano. Ni preferas subvencii junajn kandidatojn el malpli prosperaj landoj, kiuj havas realajn eblojn kaj planojn poste instrui la lingvon. En 2009 3 el la 4 subvencioj kompletigis la kurson kaj efektive plue agas.

La itala movado decidis subteni kandidaton, sed mankis kandidato; ĉi-jare du polaj kandidatoj estas enlande subvenciatitaj. Se Landaj Sekcioj aŭ Landaj Asocioj anoncas enlandajn stipendiojn, ili rajtas starigi siajn proprajn kriteriojn aŭ transpreni aŭ adapti niajn.

La voĉdono pri la akcepto de la estrara raporto pri 2009. montriĝis ke 12 voĉoj estas por, neniuj kontraŭ, neniuj sindeteno.

#### *Juna Amiko*

Varbado estas necesa kaj kunlaboro estas petata. Laŭ André Grossmann el Francio diras ke

varbilo devas esti malpli granda, ekzemple je la formato A5; ni devas publikigi ĝin kie ajn eblas! Temas pri du aferoj: afiŝoj povas esti ajngrandaj, sed ni devas ankaŭ liveri prespretajn reklamojn, kiujn redaktoroj povos facile enpreni en siajn revuojn. La abono al Juna Amiko estas por kalendara jaro estas la respondo al tiucela demando.

La voĉodono rezultigas: 12 por, neniun kontraŭ aŭ sindentenojn.

### ***Buĝeto:***

Stefan: ni tenas la kostojn malaltaj. La pli alta sumo ĉe libroj estas pro la reeldono de "Manlibro pri la instruado de Esperanto". Estas peto publikigi la ciferojn pri la pasinta jaro, kaj sur papero. [SMG: La spezoj 2009 aperis papere en la konferenca libro. Se temas pri 2008, tiuj aperis kune kun 2009, 2010 kaj buĝeto 2011]. Responde al demando pri la kostoj de presado de IPR; la prezidanto diras ke estas utile ke la administracio estu ĉe FEL en Flandrio, ĉar ILEI ne havas fortojn prizorgi tion aliloke. Koloroj en la gazeto estas akcepteblaj. Kubo proponas mem aĉeti aparaton, sed tion la prezidanto malkonsilas. Laŭ li estas pli bone, konvene kaj malmultekoste resti ĉe FEL.

10h50 Voĉdonado pri la tuta propono: 12 (ĉiuj) estas por.  
Per tio ni senŝarĝigas la estraron.

La prezidanto skizas vizion por la rolo de ILEI. Klare UEA estas kaj restas la "unua" kaj plej granda ludanto; ILEI devas labori kaj kreski por esti "dua"; laŭ la fama reklama slogano: "Numero du klopodas pli forte". La kritika faktoro estas laborfortoj, sekcioj povus ankaŭ labori por la internacia ILEI; la komisionoj devus agi pli efike; ni provu transiri de statikaj komisionoj al aktivaj projektoj. Edukado.net tre bone funkcias kaj kunlaboras kun ni, plenumante diversajn taskojn, kiuj alikaze ILEI devus fari. Ankaŭ Lernu.net kaj E@I estas ekzemploj de projekto-bazita agado.

La estraro volas laborigi volontulon; por tio estas 2400 eŭroj dediĉotaj en 2011. Loko por volontulo ĉe UEA kostus eble 10.000 eŭroj, do tio ne konsidereblas. Verŝajne devos temi pri portempaj laborantoj. La fizikaj kondiĉoj por tiu volontulo formiĝas en la Esperanto-urbo, Herzberg, kie ekzistas ejoj kaj maŝinoj.

S-ino Synnove Mynttinen (Finnlando) proponas elekti Bjalistokon pro la urbo kaj pro tio ke la vic-urbestro faras multe por la E-movado; oni beligis la urbocentron; estas E-biblioteko. La urbestraro petis kaj ricevis subtenon de Eŭropa Unio por tio.

En Svedio estas eblo dungi personon dum 2 jaroj kiun la ŝtato pagas; por tio oni devas trovi bonan personon. Stefan diras ke en Germanio ekzistas simila eblo pri subvencio.

### ***Rilatoj kun UEA***

La Strategia plano de UEA estas reverkata, la prezidanto membras en la koncerna laborgrupo. La nuna plano difinas klaran prioritaton al la instruado, kiu devas konserviĝi en la nova plano. ILEI estas respondeca por la eduko de esperantistoj; instruistoj kreas esperantistojn per instruado kaj edukado. UEA delegis al ILEI laŭ la ĝisdatigita interkonsento la taskon prizorgi signifajn partojn de la movada eduka laboro.

ILEI intencas peti por la nova jaro financan disponigon ĉe UEA por konkretaj edukaj projektoj. UEA ne kovros niajn ĝeneralajn deficitajn. ILEI volas elpaŝi ĉe UEA, ke unu oficisto aŭ volontulo plenumu taskojn por realigi la kernajn asociajn celojn – informado, instruado, aplikado. Estas moviĝo ene de UEA, ke la asocio dediĉu modestan sed klaran parton de siaj buĝetoj al tiu celplenumado, kaj ILEI aliĝas al tio.

Raportinto: Simon Smits. Prilaboris: SMG